**N I A  V O Ĉ O**

**Madrida Esperanto-Liceo**

San Alejandro 6-4ºB-Ext. 28005 Madrid

(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **APRILO 2002**

Nia Voĉo estas legebla en internet ĉe la TTT-paĝo de Andaluzia Esperanto Unuiĝo:

http://www.ciudadfutura.com/esperanto

**DENOVE AL EXPOLINGUA**

Kvankam HEF planis ne prezentiĝi ĉi-jare en la lingvo-foiro Expolingua, ĵus la organizantoj ofertis SENPAGAN standon de 6 kvadrataj metroj, kun meblaro kaj elektro. Do, denove Esperanto montriĝos tie, jam la kvaran fojon. Ĝi okazos de la 11ª ĝis 14ª de aprilo en Recinto Ferial de la Casa de Campo.

**ĈEF-DELEGITO DE UEA**

Dum la lastaj jaroj Augusto Casquero kunordigis la delegitan reton de UEA en Hispanio. Ĉar li deziras ĉesi, HEF proponos la madridanon Fernando Moral kiel hispana ĉefdelegito por la periodo 2002-2004.

**NOVA LIBRO**

Valencia Esperanto-Federacio eldonis la libron "Esperanto en Valencia Komunumo" de Antonio Marco Botella. 200-paĝa volumo kun abundaj detaloj, la historio de la movado en la Valencia Komunumo, ekde la apero de Esperanto ĝis la jaro 2000 kaj pliaj informoj, biografiaj notoj de esperantistoj, asocioj, ktp. (10 eûroj)

**E-REVUOJ**

En la Madrida Revukolektejo (Hemeroteca Municipal, ne temas pri la Nacia) vi povas trovi kelkajn malnovajn esperantajn revuojn. Tonjo del Barrio notis:

Kelkajn numerojn de "Nia Vivo", de Zaragozo
1931-36 -Malmulte de "Nova Sento" de Bilbao
1937-48 "Renoviĝo" de Meksikio
1916 "Antaŭen esperantistoj", de Peruo
1903 "Esperanto" de Madrido
1937-39 "Popola Fronto", de Valencio

Tiun ĉi lastan mi trafoliumis. Ĝi estas la plej interesa el historia vidpunkto: memoru ke ĝi estis eldonita dum la interna hispana milito, ĉefredaktita de Luis Hernández Lahuerta, kiu estis dum multaj jaroj sekretario de HEF kaj redaktoro de Boletín. En la Kolektejo troviĝas pluraj numeroj (ne la tuta kolekto), kaj ĝi estas mikrofilmita.

La Hemeroteca estas en la Palaco de la Grafo-Duque (el Palacio del Conde-Duque) proksime de la HEF-ejo, kaj oni povas konsulti la revuojn post tre malmultaj burokrataĵoj.

**ZAMO**

José María Navarro López, en Madrido, kreis komputilan lingvon aû kodon kiu, laû li, avantaĝas al la nun uzataj por transsendi tekstojn per komputilo, kaj ankaû por aûtomata tradukado. Ĝi estas farita surbaze de Esperanto kaj li nomis ĝin ZAMO. La laboro estas preskaû finita, kaj nun li serĉas entreprenon kiu lanĉu la komputilan kodon. (Boletín 354)

**KVARTALO VILLAVERDE (MADRIDO)**

Post la prelego de Juan del Castillo en la Kultura Centro "Ágata" kiun ĉeestis preskaû 20 maljunuloj, Juan atendas tempo-rezervon por prelegi en majo en la Centro "Los Rosales" en la sama kvartalo. Li esperas ke post la prelegoj la Centroj organizos bazan kurson.

**REELDONO DE "Nuevo método de esperanto"**

Prezo: 7,52 EUR (1.250 ESP) inkludas impostojn sed ne sendokosto. Rabato: 20% se vi aĉetas 10 aŭ pli ekzemplerojn. Petu al: Esperanto Liceo de Madrid. admin@esperanto-es.net

**NIA VOĈO**
**APRILO 2002**

**HISPANAJ VORTAROJ**

Ŝajne, Editorial Sopena elĉerpis sian stokon de la poŝvortaro ĉar petis de HEF 50 ekzemplerojn de Lexicón. En la konversacia rondo de MEL multfoje oni parolis pri la konveno eldoni URĜE la vortaron hispana-esperanto-hispana verkata de M.G. Adúriz, sendube pli aktuala ol Lexicón.
A. Casquero kunordigas la eldonadon de la granda vortaro hispana-esperanto de F. De Diego. La buĝeto por 1.000 ekzempleroj estas 13.250 eŭroj. Oni serĉas financadon.

**E-LIBROJ EN LA VALENCIA PUBLIKA BIBLIOTEKO**

Dum la 90aj jaroj Grupo Esperanto de Valencia ricevis helpo-peton far la estroj de la Valencia Urba Biblioteko, por katalogado de granda kvanto da E-libroj kaj dokumentoj, entute ĉirkaŭ 800 titoloj. Tiuj libroj estis trovitaj en kelo de la Valencia Urbodomo, en malnovaj skatoloj, kaj temis pri la libroj de la Biblioteko de la Valencia E-asocio, malaperinta dum la Hispana Intercivitana Milito (1936-39). Ene de tiu materialo troviĝas unikaĵoj, ne nur libroj, sed muziko, gazetoj, diversaj dokumentoj (inter ili la protokollibro de la loka E-asocio, ege bela).
Nun la biblioteko, post la katalogado kun la helpo de diversaj valenciaj esperantistoj, ebligas konsulti ĝin pere de la reto. Entute oni metis en tiun elektronikan katalogon 649 titolojn.
Por konsulti la katalogon oni devas sekvi la jenajn paŝojn:
1.- http://www.ayto-valencia.es/ayuntamiento2/ndnoticias.nst
2.- Elektu "webs municipales" 3.- Elektu "Biblioteca Municipal Central" 4.- Elektu "Biblioteca Central" 5.- Elektu "Catálogo" 6.- En la linio "Materias" skribu "esperanto" 7.- Kliku sur "buscar". Aperos 10 titoloj. 8.- Kliku sur "mostrar todos" (montri ĉiujn).

**KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ** http://www.infonegocio.com/augustocasquero

18a-19a majo. Kongreso de la Valencia E-Federacio kaj Murcio. Vall d'Uxo (Castellón).
1a-7a julio. Internacia SAT-kongreso.
5a-7a julio. 61-a Hispana Esperanto-Kongreso. Alicante.
11-17 julio. HoRo. Hispana Renkontiĝo (HEJS). Salamanca.
23ª-28ª aŭgusto Eŭrop-unia Kongreso. Verona (Italio) "Efectiva lingva egaleco:rajto de la eŭropano"
24ª- 31ª aŭgusto. 28-a Internacia Semajno ĉe Mediteraneo. Séte (Francio)

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Niaj konversacia-rondoj okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

Bazaj kursoj:

ESCUELA POPULAR DE PROSPERIDAD. Instruas Toni Cebrián. Luis Cabrera 19. 28002 Madrid. Tel. 91 562 70 19. Merkrede 20,00-21,30 horo

UNIVERSIDAD AUTÓNOMA DE MADRID. Marco Trevisán
Lunde kaj merkrede 12-13h. Tel. 915 617 613

Kurso por triaaĝuloj: Centro de Día Puente de Toledo. Mercedes Arteaga 18.